



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

### PILO-PRESS

Jara abono

30,-- DM

Uzu la poŝt-  
pagilon!

### Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 36/1974 - 12. okt 1974  
Aperas ĉiusemajne

### Fervoja jarkunveno en Bamberg

**Bambergo (pp/gero)** Nenia dubo: Bambergo valoris alvojaĝon eĉ de malproksime... Kaj fakte ĉeestis pli ol 120 fervojistoj-esperantistoj el FRG kaj el Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Jugoslavio, Hispanio, Nederlando kaj Svislando la ĉijaran jarkunvenon de Germana Esperanta Fervoja Asocio en Bambergo de la 11 - 13 okt 1974.

Multipromesa estis la komenco de la renkontiĝo vendredon: tre fruktodona gazetarkonferenco, malfermo de lerte aranĝita, ree aktualigita ekspozicio, kaj vespere babila rondo bun biergaja etoso.



Die Ausstellung der Eisenbahn-Esperantisten im Grünen Saal der Harmonie vermittelt einen interessanten Überblick über das Verbreitungsgebiet dieser Sprache. Gezeigt werden vielerlei Prospekte, Stadtführer und Zeitungen aus aller Welt, die in Esperanto abgefaßt wurden  
Foto: Ft-Emil Bauer

La loka gazeto "Fränkischer Tag" favore raportis pri la kunveno kaj speciale pri la ekspozicio, aranĝita de Kurt Jentsch. La ekspozicion kaj la libro-ŝtandon de Ludwig Pickel rigardis ankaŭ kelkaj interresuloj, kiuj informiĝis pri Esperanto.

La asociajn problemojn, taskojn kaj estontajn agadojn pritraktis estraro kaj distrikta komisioj dum komuna kunsido, decidante i.a. ke la venontjara GEFA-kunveno okazu en Garmisch-Partenkirchen. Krome Karl Bernhard el Ludwigshafen sin deklaris preta transpreni la taskon de GEFA-kasisto de Kurt Jentsch.

Sabate okazis irado tra la urbo kaj aŭtobusaj ekskursoj.

La Salutvesperon ĉeestis oficialuloj de la fervoja direkto Nürnberg, de la fervoja socialorganizo kaj de sindikato fervoja. Armin Grötzner, Kronach, deklamis la poemon "La Elflego" de Goethe en Esperanto-traduko de Joachim Gießner.

Ĝis la dua horo matene restis la dancemuloj. La dimanĉmatena programo komenciĝis per temperamentplena multkolora folklorprezento kaj lerte elektita serio da diapozitivaj pri Bambergo. Post la konciza komento pri la skribe disdonita jarraporto fare de Joachim Gießner per vigla rakonto pri aviadila vojaĝo al Moskvo, Siberio, Taŝkento kaj Samarkand Otto Walder el Svislando metis brilan finakcenton al la matineo. Dankon meritas Hans Müller, Lichtenfels, distrikta komisio por direkto Nürnberg, kaj liaj helpantoj pro la bona trapaso de la kunveno. - Aldonindas la konstato de Joachim Gießner, prezidanto de GEFA kaj IFEP, ke la ŝanĝoj en la gvidado de UEA ne kaŭzas konsekvencojn por IFEP, se la novaj UEA-gvidantoj ne tuŝas la principon de neŭtraleco de UEA.

### Kunveno de bavaraĵ aktivuloj

Bambergo (pp) Post la jarkunveno de GEPA okazis dimanĉe, la 13 okt 74, posttagmezo laborkunsido de esperantistaj aktivuloj en Bavario pri Esperanto-problemoj kaj agadoj. Ĉeestis pli ol 20 personoj el Munkeno, Augsburg, Nürnberg, Bamberg, Schweinfurt k.a. urboj. Oni interŝanĝis multajn ideojn kaj decidis fari unuajn paŝojn por koordini la agadon poresperantan en Bavario. Detaloj sekvos en aparta informilo "Esperanto en Bavario".

### Pri la agado en Paderborn

Paderborn (pp) Kiel ni jam anoncis, de la 18 - 20 okt 74 okazos en Paderborn semajnfina konferenco de Laborgrupo ILUS kune kun la germana sekcio de la Eŭropa Edukista Asocio (Vidu Pilo-Press 35/74) Interesuloj por Esperanto-literaturo povas rigardi librostandon de Ludwig Pickel el Nürnberg.

En venonta tempo okazos semajnfinaĵ kursoj por anoj de firmaoj en la junulargastejo de Paderborn:

25. - 27.10.74 Por komencantoj  
15. - 17.11.74 Por komencantoj  
29.11. - 1.12.74 Por progresintoj

Informojn donas: Hermann Behrmann, 4972 Löhne 1, Bahnhofstr. 54

### Oberkirch invitas

#### Unua kongresa bulteno

Oberkirch (pp) La 53a Germana Esperanto-Kongreso okazos dum pentekosto 1975, de la 17a ĝis la 20a de majo, en Oberkirch.

Ĉefa temo de la kongreso estas "Esperanto-turismo"

#### Loka Kongresa Komitato

Walter Poppeck, prezidanto, informado

Hermann Heiß, kasisito, sekretario

Gerhard Kranz, loĝado, giĉetoj

Margot Kranz, programo, ekspozicio

Kongresejo: La kongresaj aranĝoj estos en la urbohalo konstruita dum 1973.

Adreso: Ĉiuj korespondaĵoj pri la kongreso estu direktitaj al

Esperanto, 7602 Oberkirch, Lohmühlweg 1

Kotizoj: Ĝis 31.1.75 Ekde 1.2.75

Kongresan(in)o 20,- DM 23,- DM

Edz(in)o 12,- DM 15,- DM

Studento/lernanto

ĝis 25jara 12,- DM 15,- DM

Pagojn oni sendu al jenaj kontoj:

Esperanto-Grupo Oberkirch e.V.

Deutsche Bank AG, Fil. Oberkirch (BLZ 664 700 35)  
Konto 701 227

Postscheckamt Karlsruhe, Konto 473 31-757

Pliaĵ detaloj sekvos en la venonta numero de Pilo-Press !

Aliĝu baldaŭ! Aliĝoj enestos en unu el la venontaj numeroj!

## Kopenhago, Urbo de la 60a UK

Jam la trian fojon en kvarona jarcento, la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, la ĉefurbo de Danlando.

Jam en 1956 kaj 1962 la partoprenantoj de la Universala Kongreso havis la okazon persone sperti ĝian amikecan etoson. Kiuj vizitos ĝin denove, tiuj trovos multajn ŝanĝojn. Kreskis tute novaj, modernaj urbopartoj – tamen la malnovaj kvartaloj konservadas sian monde renoman ĉarmon.

En Kopenhago oni estas proksime al la maro. La freŝa aero de la Sundo, kiu dividas Danlandon disde Svedlando, konstante refreŝigas la urbon; la multaj parkoj kaj la arbaro ĉe la norda limo de la urbo rompas tiun impreson de stondezerto, kiun donas multaj grandurboj.

Kopenhago proponas al vi elekton inter multaj hotel-specoj: ekde lukse modernaj kun ĉia komforto, ĝis pli modestaj hotelĉambroj je moderaj prezoj. Por tendumantoj troviĝas vasta kaj bone ekipita kampadejo proksime al la kongresejo.

La reto de aŭtobusoj kaj elektraj trajnoj facile transportas vin inter la hoteloj, kongresejo kaj amuzejoj, se vi ne preferas piediri 10-15 minutojn. Muzeoj kaj preĝejoj estas tuttage viziteblaj, kaj la fama Tivoli certe meritas viziton iun tagon aŭ vesperon. Restoracioj abundas por ĉiaj gustoj kaj monujoj.

BONVENON AL KOPENHAGO!

## Provizora programo

Kunsidoj de la Komitato kaj Estraro de UEA – Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA – Debato – Kunvenoj de fakaj organizaĵoj, landaj asocioj, informaj fakoj, delegitoj de UEA – internacia ekzameno – Belartaj Konkursoj – Internacia Somera Universitato – teatra prezento – Dana Vespero – filmprezentoj – Internacia Arta Vespero – Solena Inaŭguro – Interkona Vespero – Bankedo – Balo – Junulara Vespero – ekskursoj – konversaciaj rondoj – Solena Fermo – Diservoj – 15-a Internacia Infana Kongreso – 43-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj – 31-a Internacia Junulara Konferenco de TEJO – Oficiala Postkongreso en Aarhus, Danlando.



**Unua  
Bulteno**

de la jubileo

## 60a Universala Kongreso de Esperanto

Frederiksberg (Kopenhago) Danlando  
26a de julio – 2a de aŭgusto 1975

Aligu tuj al la 60a UK  
Uzu la aldonitan aligilon!

## Mesaĝo de la Urbestro



*Ni vivas en tempo, en kiu la eblecoj por kontakto inter la popoloj estas pli grandaj ol iam antaŭe – kaj ankaŭ pli signifoplenaj, ĉar vigla kontakto estas la plej bona garantio por la mondopaco.*

*Lingvaj baroj malfaciligas ĉi tiun kontakton, kaj la plej multaj homoj devas lerni ankoraŭ unu lingvon flanke de la gepatra.*

*Eble Esperanto estas la solvo.*

*En tiu senco mi kun ĝojo ekscias, ke la 60-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Frederiksberg en la somero 1975.*

*Frederiksberg situas en la koro de la dana ĉefurbo, ĉirkaŭata de la komunumo Kopenhago je ĉiuj flankoj. Ĝi estas komunumo kun proksimume 100 000 enloĝantoj kaj estas tute memstara kun propra urbdomo, propra hospitalo, propraj lernejoj kaj instruistoj kaj tiel plu.*

*Ni nomas la komunumon "La verda komunumo", ĉar ĝi estas tipa loĝeja komunumo kun parkoj kaj verdaj plantejoj, sed ĝi estas ankaŭ viva grandurbo kun granda trafiko, multaj muzeoj kaj riĉa komerca vivo.*

*Mi esperas, ke vi, partoprenantoj en la Kongreso, havos tempon ĝui la specialan atmosferon de Frederiksberg kaj senti, kiom bonvenaj vi estas en nia komunumo.*

*Kun afablaj salutoj*

*A. Stæhr Johansen  
Urbestro de Frederiksberg  
Membro de la dana parlamento*

## Landaj perantoj

F.R. Germanujo: S-ro Ludwig Pickel, poŝtfako 2113,  
D-85 Nürnberg 2

Norvegujo: Turisma Servo de NEL, Boks 942, Oslo

Svedujo: S-ino E. Andrén (por SEF), Regementsgatan  
27 D, Sv., S-21753 Malmö

Svislando: S-ro O. Walder, Esperanto-Str., CH-8590  
Romanshorn

*En la aliaj landoj funkcias kiel kongresaj perantoj la landaj kotizieroj de UEA. Detala listo aperas en la Jarlibro de UEA.*

## Antaŭpresoj el Germana Esperanto-Revuo 6/74

aperonta en la venontaj tagoj

### SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ 1974 18 kursoj dum tri semajnoj

**Kraŭla pli-malpli „nur esperantisma“ renkontiĝoj okazis ĉi-somere — konkrete: de la 4-a ĝis 25-a de aŭgusto 1974 — ankaŭ tute aliaŝpece kunveno. La dua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj evoluis, en la bezonata trunkvilita otoso, en la moderna universitata kampuso de Sart Tilman (Lieĝo, Belgio).**

La programo de tiu ĉi SUK-sesio estis pli vasta kaj pli densa ol tiu de 1972: En 3 studdirektoj (biologio, kemio, sociolingvistiko) estis prezentitaj sume 18 kursoj (de po minimume 8 lekcioj 45-minutaj) fare de 9 universitataj instruistoj el Argentino, Francio, Grandbritio, Japanio, Kanado, Norvegio kaj Usono. La lekcia horaro estis tiel aranĝita ke oni povis plene sekvi ĉiujn kursojn de biologie kaj kemio. Sekve, oni studadis de la 9-a matene ĝis la 17-a posttagmeze. — Ekster la vera studprogramo. Claude Gacond (Svislando) gvidis aŭd-vidan perfektigan Esperanto-kurson dum la du unuaj semajnoj. — Ceeslis, sume, proksimume 50 personoj el 15 ŝtatoj, aŭ dirite el alia vidpunkto: ĉiusemajne partoprenis pli ol 20 SUK-anoj.

Tamen, en Lieĝo oni ne nur aŭskultis lekciojn sed oni ankaŭ faris studvizitojn al la zoologia muzeo kaj al la mikslingvaj regionoj norde kaj oriente de la provinca ĉefurbo. Krome, la studentoj kaj lekcistoj ekskursis tra la bela Valonio, „ekzamenis“ la urbocentron kaj ceeslitis lumbildprelegojn pri Portugalio, Peruo kaj Kenjo. Unu vespero estis dediĉita al la lingva situacio en Norvegio.

La SUK-estraro prizorgis ankaŭ eksterajn rilatojn: Nome de la universitata rektoro, la dekanato de la filozofia fakultato, per vortoj, ĉampano kaj keksoj, akceptis la SUK-anojn. Ankaŭ la urba skabeno pri kulturo, en akompano de reprezentanto de belga ministro, bonvenigis la gastojn en la

historia urbodomo. Al la kampo de publika rilatoj apartenas ankaŭ la Honora Komitato, en kiu membris la belga ĉefministro, pluraj ministroj parlamentanoj, la ekleziaj moŝtoj kaj rektoroj, dekanoj kaj profesoroj de belgaj kaj eksterlandaj universitatoj. Fine, la populara ĵurnalo „Le Meuse“ konvice raportis pri la ĉi-jaraj SUK.

Kvankam la simpla efektiveco de tiu dua sesio de SUK jam signifas sukceson (precipe se oni konsideras la altgradan indiferentecon de la Esperanto-movado), tamen plej elstaras la fakto ke jam estas eldonitaj 11 kursolektroj de po — meznombro — 70 paĝoj. Pliaj 4 lektroj estas preparataj respektive presataj. Tiel SUK tre konkrete kontribuas al la pliampleksiĝo de la sciencoliteraturo en la Internacia Lingvo.

Kaj estonte? Se la universitato de Lieĝo denove disponebligos al la SUK-asocio ŝenokoste la lekciojn kaj se troveblas kompetentaj instruistoj, la tria sesio okazos dum la somero de 1976, probable pri matematiko, biologio (zoologio) kaj sociologio. Eventuale, la esperantistaro (ĉefe la junuloj kaj unuavice la studentoj) iom pli klare konscios pri la gravaj funkcioj de tiuj altgradaj instru-manifestacioj interalie por la prestiĝo de la Internacia Lingvo.

La organizantoj (Someraj Universitataj, Boite postale 9, B-4000 Lieĝe 3) estas je dispono por ĉiaj sugestoj, informpetoj ktp.

u j m

### KONKURSO

10-taga ekskurso tra Pollando kaj multaj valoraj objektaĵaj premioj fariĝos gajnitaj de eksterlandaj aŭskultantoj de la Pola Radio, kiuj respondos al niaj demandoj:

1. Kiun el la disaŭdigoj de la Pola Radio vi aŭskultas plej ofte kaj kial?
2. Kiajn rimarkojn vi havas koncerne niajn antenajn programerojn en Esperanto?

Respondo al unu el la supraĵaj demandoj jam rajtigas al partopreno en la lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P. O. Box 46, Polska — en kortvetoj signitaj per la devizo: „Konkurso“, ĝis a 30 de oktobro 1974 j. /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultojn ni anoncos en ĉiuj Esperanto-disaŭdigoj la 25 de novembro 1974 j.

La ekskurso de la laureato de la ĉefa premio okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni petas popularigi la konkurson inter amikoj, konatoj, personoj korespondantaj kun vi, kaj ankaŭ inter la membroj de lokaj esperantistaj kluboj.

Ni deziras sukceson en la lotado de la premioj.

Pola Radio

### Hans Jakob Kristof de Grimmelshausen LA AVENTUROJ DE SIMPLICIUS SIMPLICISSIMUS

Unua libro  
LA TRIA ĈAPITRO  
raportas pri la kompatemo de fidela sakfajfilo

Do, mi komencis fortegan ludadon per mia sakfajfilo, tiel ke per ĝi oni povus venenigi bufojn en la brasikĝardeno. Tiel mi sentis min sekura antaŭ la lupoj, pri kiuj mi konstante pensis. Kaj ĉar mi ekmemoris, ke mia Meŭder (tiel oni nomas la patrinon en la Spesart-montaro kaj ĉe la monto Vogelsberg) ofte diris, ke ŝi timas, ke iam pro mia kantado mortos la kokinoj, mi akompane kantis, por ke la medicino kontraŭ la lupoj estu des pli forta, jenan kanton, kiun mi lernis de mia patrino:

### Petrarca post ses jarcentoj

La 19-an de julio pasis ses jarcentoj de la morto de Francesco Petrarca, la plej famkonata (kune kun Dante Alighieri) el la poetoj de la frua periodo de la itala lingvo.

Iom pli nekonformisme, ni skizu la ĉefajn trajtojn de la vivo de Francesco Petrarca kaj lia verko. Li naskiĝis en Arezzo, toskania urbo sude de Florenco, la 20-an de julio 1304a.

### Radio — televido — gazetaro: Kiel reĝis la Kongreso?

La 59-a Universala Kongreso — la unua en FR Germanio de post 16 jaroj — vekis konsiderindan atenton ĉe la en — kaj eksterlandaj amaskomunikiloj. Post okazaj notoj, precipe en la hamburga gazetaro, meze de julio komencis aperadi pluraj, parte tre ampleksaj artikoloj pri la okazinta kongresa evento, i. a. sur la tria pripolitika paĝo de Süddeutsche Zeitung (17-7), en la tutlanda Die Welt (24-7) kaj en Handelsblatt (26-7). En la plej grava semajna gazeto Die Zeit (26-7) aperis artikolo de Prof. Helmar Frank pri la eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj, kaj samtage Katolika Novaj-Aĝejoj distribuis longan raporton pri la Kongreso de Kristanaj Esperantistoj.

Versajne senprecedence multnombrian partoprenon (de entute 22 ĵurnalistoj) spertis la Gazetara Konferenco, la 26-an de julio. Post ĉi unuhora daŭro, la prezidantaro de la Konferenco (Prof. Lepenna, Ge-roj Bormann, G. Becker kaj U. Lins) estis intervjuita de la radiostacio Deutschlandfunk: la elsendo (ĉ. 10 min.) okazis la 3-an de aŭgusto. Vendron kaj sabaton posttagmeze kaj vespere preskaŭ ĉiuj regionaj radio-stacioj en FR Germanio kaj okcidenta Berlino disaŭdigis, en la kadro de vort-muzikaj programoj, rektajn intervjuojn kun kongresaj funkcianoj (el tiuj 6 kun D-ro Bormann); ankaŭ Esperantaj kanzonoj estis elsenditaj. La 26-an vespere D-ro Bormann aperis en nordgermana televida programo por ĉ. 7-minuta intervjuo. La 27-an posttagmeze H. Behrmann plurfoje aŭdigis sin, en porĵurnalara radio-programo, pri „Esperanto programita“ kaj lernejoj eksperimentoj, kaj la 29-an vespere Prof. Frank dum dek minutoj raportis siajn spertojn pri Esperanto en priklurata elsendo de Sarlanda Radio. Scenojn el la Inaŭguro prezentis, dimanĉon vespere, la novaĵ-magazino de Dua Germana Televido (tutlande videbla). Televidaj spektantoj en norda Germanio povis rigardi la 2-an de aŭgusto kelkminutan miksperton el la Kongresejo: esperimentlingvan anoncon de la pola aktorino Kalina Pienkiewicz, la Kwarteton Esperanto, intervjuojn kun IFEF-prezidanto Giefner, BEA-prezidanto Leon-Smith kaj ekministro Choŭ kaj scenojn el „La Barbio de Sevilla“. Fine de la Kongreso, la 3-an de aŭgusto, en aktuala felietono de la radiostacioj Kolonjo kaj Hamburgo D-ro Bormann informis pri la politikaj aspektoj de la UK. Statistike eĉ ne registrebla estas la mencioj de la Kongreso en la kadro de ordinaraj novaj-elsendoj en radio kaj televido.

Lia patro estis florenca, apartenanta al la blanka partio, kiu favoris la Papon kontraŭ la Imperiestro; iumomente, tiu partio malgajnis, kaj li devis forlasi Florencon, kune kun la filo. Tiel okazis, ke Francesco Petrarca ekloĝis en Francujo, en Avinjono, kien la papo Klemento la kvina estis transportinta la papan sidejon; kaj en Francujo Petrarca komencis siajn studojn pri gramatiko, retoriko, dialektiko kaj juro.

Atinginte 20 jarojn, Petrarca revenis al Italujo, kaj daŭrigis siajn studojn en Bolonjo, kies universitato ĝuis altan reputacion.